



NEW BOOKS

Order starred books from the B.E.A.;
others from the addresses given.

Verkojn por recenzo oni bonvolu sendi po du ekzempleroj al la Sekretario, B.E.A., 140, Holland Park Avenue, London, W.11: ne al la Redaktoro.

***Kontralte.** Originala poemaro de Marjorie Boulton. Antaŭparolo de William Auld. Kovrilo de John Hartley, kaj portreto de la aŭtorino. Stafeto, Belliteratura serio 5. Eldonita de J. Régulo, Kanariaj Insuloj. Formato 22.5 × 16 cm., 288 paĝoj. Prezo 12 ŝil., afranko 9p.

Kun ĝoja scivolo mi malfermis la imponan noveldonadon de Stafeto, kaj traleginte ĝin mi kun fiero metis ĝin al libroj plej bonaj, al kiuj oni ne hezitas revenadi. Ĉar *Kontralte* estas trezorejeto de vera kaj plensanga arto. La aŭtorino, triobla premiitino en la lastjara Belarta Konkurso de U.E.A., en lastaj jaroj vekis atenton sur paĝoj de plej gravaj Esperantaj gazetoj per siaj artmaturaj poemoj. Tamen la riĉenhava poemaro *Kontralte* multajn surprizos, kaj starigas la poetinon inter la stelojn de la unua rango sur nia poezia firmamento.

Jam post la unuaj poemoj ni rimarkas, ke al ni parolas poetino de alta klero kaj forta esprimpovo. Multifaceta estas ŝia personeco kaj multifaceta ŝia arto kapabla vin ravi.

En la unua parto "Trista Tenereco" parolas al ni en perfektaj versoj majstramane ĉizelitaj komprenema, tenera koro de juna edukistino, etendanta amikan manon al siaj konfesemaj studentinoj, kies junajn ekburĝonojn kaj amdolorojn ŝi scias konsoli—sentante mem senkonsolan forlasitecon propran. Partoj "Unu virina koro" kaj "La ora branĉo" prezentas al ni en aŭdaca sinesprimo la vitalan vivsoifon de juna korpo

kaj de animo strebanta al harmonio, kiujn la fato forbaras de amato neposedebila. Kiom da amaro, da interna amobrulo, da aŭdacaj vansopiroj, da virina tenero en tiuj brilaj versoj luktas inter si! Plej ofte nur viro tiel kuraĝis eldiri siajn sentojn. Veraj ĉarmaĵoj estas "Komika deziro" kaj "Simpatio", kaj juvelaj strofoj de "La ora branĉo" sugestas komparon kun la forta amkonfeso de Tatjana de Puŝkin.

La lingvo de Marjorie Boulton estas esprimriĉa, freŝa, kaj inventema. Apenaŭ troveblas kritikeblaĵoj. En poemo "Retro" mi evitus poezian licencon uzi verbojn "senvesti", "senkateni" transitive. Laŭ reguloj de vortfarado tiuj vortoj havas primaran karakteron adjektivan: sen/katen/o/a, sen/vest/o/a, do senvesti, senkateni, senmoni estas: esti, impresi, efiki senvesta, senkatena, senmona. Por senvestigi, senkateniĝi uzeblas korektaj mallongaj formoj malvesti, malkateni. Sur p. 99 devus versduo: "Mi ĉiam, ĉiam, ŝajnas havi/ vestaĵojn brosi, gladi, lavi," korektiĝi je ". . . /vestojn por brosi, gladi, lavi". Krom ĉi tiuj du lokoj mi trovis nenion riproĉeblan, kaj tio estas admirinda, se oni konscias, ke la poetino tiel verkis post apenaŭ 6-jara Esperantisteco.

La valoran libron mi povas varme rekomendi. La luksa ekipa, manko de preseraroj, belgusta grafika aranĝo, kreta papero, entuziasmigis ĉiun estetikulon.

Jiri Korinek.